



Oficiala Organo de
Kuba Esperanto-Asocio
(4/2005, okt – dec)
Aperas 4-foje jare

Eldonas:
Kuba Esperanto-Asocio
Poŝtfolio 5120,
10500 Havano, Kubo
Telefono: +53(7)40 4484
Fakso: 643 8729
Retadreso:
avanco@esperanto.co.cu

Ĉefredaktoro:
NORBERTO DÍAZ GUEVARA
norberto@ssp.desoft.cu

Revizias kaj kontrolas:
JULIÁN HERNÁNDEZ ÁNGULO
ALBERTO F. CALIENES
MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ
JUAN R. RODRIGUEZ GÓMEZ

Enpaĝigo:
NORBERTO DÍAZ GUEVARA
ALBERTO F. CALIENES

Reproduktado permesata.
Interŝanĝo dezirata.

La kovrilo:

Ronald Baby, gvidanto de la E-Klubo en Universitato de Informadikaj Sciencoj (UCI) instruas per tre modernaj metodoj al pli ol okdek tieaj gestudentoj el la tuta lando. La novaj teknologioj ebligas aliron al sonarkivoj, filmoj, vortaroj, ciferecaj libroj... kaj la klubo disponas pri retpaĝo en la interna reto kun babilo kaj multaj aliaj servoj. La novaj generacioj garantias brilan estontecon.

estimata leganto

Foje la movada agado restas enkadrita en la loko mem, aŭ nur pere de raportoj al ĉefe Esperantaj gazetoj kaj amas-komunikiloj, ĝi diskoniĝas kiel okazintaĵo aŭ plenumo de tasko.

Sed Esperanto celas interhoman komunikadon, kaj tre gravas ankaŭ koni la opiniojn kaj sentojn de esperantistoj, kiuj havis okazon vojaĝi per aŭ por Esperanta kontakto, ĉar tiel eblas pruvi, ĉu la la movado praktike funkcias aŭ ne.

Do, vi trovos en tiu ĉi numero vortumitajn pensojn de eksterkubaj esperantistoj, kiuj vojaĝis al la lando kaj konatiĝis kun la movado.

Al la ĉi-numera propono sumiĝu la novjaraj salutoj, kiuj ĉiam plenplenu de bondeziroj al ĉiuj kaj esperoj pri pliaj sukcesoj de Esperanto

Agrablan kaj nutrivan legadon! Kun Avancaj salutoj,


Norberto Díaz Guevara

enhavo

Scienco, tekniko kaj Esperanto	3
NORBERTO DÍAZ GUEVARA	
El la malproksima Japanio	4
YASUKO SASAKI	
Rusa esperantisto en Kubo	4
KIRILL YARMARKIN	
Ĉu UK havas sencon?	5
EDDY RAATS	
Kubo – la duan fojon	7
WINFRIED SCHUMACHER	
Trans Atlantikon	8
JEAN LOUIS-TEXIER	
Noticoj	10
Daŭre entreprenenda tasko por la Kuba movado	14
JULIÁN HERNÁNDEZ ÁNGULO	

Scienco, tekniko kaj Esperanto

NORBERTO DÍAZ GUEVARA

Kiu estus povinta imagi en 1887, kiam aperis la unua broŝuro de la tiam nomata Internacia Lingvo, ke post pli ol cent jaroj ĝi plu aŭdiĝos en la mondo kaj aparte estus forta lingvo en Interreto?

Estas krome notinda la plifortiĝo de Esperanto en la scienca kaj teknika medio, kie aperis kaj aperadas diversfakaj katalogoj, fakvortaroj, tradukitaj kaj originalaj verkoj, terminaroj kaj okazas en plej diversaj mondopartoj pluraj eventoj pri apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko.

Verkoj kiel *Absoluta analitika geometrio*, de d-ro C. Vörös; *Teorio de ondoj*, de d-ro Kelte; *Rezisto de la ĝisaj kolonoj*, de Villareal; *Medicina teknika vortaro*, de Briquet; *Arkitekturo, Arkeologio, Konstruo kaj Arto*, de Azorin; *Maŝinfaka esperanta vortaro pri elementa*, de Wüster; *Komerca Vortaro en Esperanto*, de Kreuz-Mazzolini; *Leksikono Japana-esperanta de Kemio kaj Farmacio*, de Japana Rondeto de Fakistoj; *Vetero kaj klimato de la mondo*, de Riley kaj Spolton; pravas la utiligon de la lingvo en grava medio.

En Vikipedio, la libera interreta enciklopedio, kiu impone atestas pri la utiligo de Esperanto, aperas la informoj, ke en 1899,

nur 12 jarojn post la publikigo de la lingvo, estis prezentita al la Franca Akademio de Sciencoj komunikajo pri la internacia lingvo, al kio sekvis pliaj komunikoj kaj eĉ leteroj pri la servoj, kiujn Esperanto povas havigi al sciencoj. Internacia Scienca Asocio Esperantista fondiĝis en 1908, kaj multaj sciencistoj el la tuta mondo apogis ĝin. La oficiala organo estis *Sciencia Revuo*.

Esplorado per la interreta serĉilo Google, donas kiel rezulton proksimume 43 mil aperojn de la kombino 'scienco' + 'tekniko' + 'esperanto', inter kiuj abundas la anoncoj kaj raportoj rilataj al renkontiĝoj pri aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko. Se al tiu kombino aldoniĝas la vorto 'kubo', la rezulto estas proksimume 227 aperoj.

Kuba Esperanto-Asocio okazigos la Seminarion pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, la 19an kaj 20an de majo 2006.

La kubaj esperantistoj pruvos, ke la apliko de la internacia lingvo en la teknika mondo estas grava branĉo de la loka movado, kie sciencistoj kaj teknikistoj de diversaj fakoj, povas multon kontribui al la valoro de la lingvo en tiu medio, kaj riĉigi la historion naskiĝintan, mi diru, en 1899.

**Seminario pri
Apliko de
Esperanto en
Scienco kaj
Tekniko**

Havano
19a-20a de majo 2006

La kuba movado en internacia kontakto

Petite de la ĉefredaktoro, esperantistoj el diversaj mondopartoj sendis siajn impresojn pri la kontakto kun la movado en la kariba insulo, kaj jen iliaj kontribuoj. La paĝoj de Avanco pretas por la viaĵ.

El la malproksima Japanio

Ĉiam mi estas surprizita de la Esperanta movado de kubaj esperantistoj, ĉar vi grande progresas pere de riĉaj Esperantaj agadoj!

Jam antaŭ 13 jaroj, mi partoprenis en la 75a Universala Kongreso en Havano, en 1990, kiam aperis en la bankedo la kuba prezidento Fidel. Ni estis ege surprizitaj kaj ĉiuj aplaudis kaj aplaudis!

Ni ankaŭ partoprenis la 46an Junularan Kongreson, en Playa Girón. Tie junuloj tre vigle parolis, kaj mi konstatis la sukcesojn de la kubanoj! La kuba popolo estas gaja, kaj ne nur la esperantistoj, ĉar ĉiuj estis komplezemaj, simpatiaj.

Belega blua maro bonvenigis nin kun multe da kubaj esperantistoj, kaj tio ĝojigis min.

Mi eikore gratulas vian asocion!

En la jaro 2007 okazos en Jokohamo, Japanio, la 92a Universala Kongreso, kaj ni ĉiuj volonte bonvenigos vin.

Sincerajn salutojn de

YASUKO SASAKI, Japanio

Rusa esperantisto en Kubo

La unuan fojon mi vizitis Kubon printempe 1984 kiel turisto. Tiam mi malmulton sciis pri via belega lando, eĉ dubis: ĉu la vojaĝo estos interesa. La funkciulino de la vojaĝ-

agentejo certigis: "Vi nepre estos kontentaj!" Eble ŝi mem ne konsciis pri sia praveco. Du semajnoj pasis simile al mirinda sonĝo; ni veturis laŭ la itinero Havano-Playa Girón-Trinidad-Varadero-Havano.

Kvankam mi jam estis sperta esperantisto, mi ne sukcesis renkonti samideanojn pro la manko de tempo kaj la multaj impresoj pri la vojaĝo. Mi revenis hejmen kun Kubo en mia koro kaj tuj komencis lerni la hispanan lingvon, kio ĝis nun estas mia ŝatokupo.

El Varadero, kiam jam estis klare, ke mia deziro kontakti kuban esperantiston fiaskis, mi sendis leteron al samideanino s-ino Rosa Castañeda Guerrero (Sancti Spiritus): mi trovis la adreson en Jarlibro. Komenciĝis nia daŭra kaj fruktodona korespondado. Danke al ŝi mi pleje eksciis pri Kubo, kaj pro tio mi profunde dankas ŝin. Certe mi legis librojn pri Kubo, la verkojn de kubanoj ktp.

Mi estas inĝeniero kaj maristo. En la okdekaj jaroj de la pasinta jarcento mi ofte vojaĝis tra Atlantiko, vizitis landojn de Okcidenta Afriko, Suda Ameriko. Nur Kubo estis ekster miaj vojdirektoj. Mi tiam laboris en la scienca geofizika marŝipo "Profesoro Kurentsov".

La nova sukcesa neforgesebla ekspedicio startis en la jaro 1990. El la malvarmo kaj malhelo de la polusa nokto ni transiris al la varmo de sudaj maroj, kia feliĉo! Post du semajnoj mi vagadis en stratoj de Havano.

Kvankam mi ne havis multan liberan tempon, mi trovis kaj vizitis la ĉefoficejon de KEA kaj interkonatiĝis kun gesamideanoj, post kiam ĉiam mi sentis la homan varmon de la ĉefurbo de Kubo. Ĉiuj esperantistoj estis afablaj, tamen la plej varmajn rilatojn estiĝis kun samideanino s-no Marcela Fernández Leblanc.

Post nelonge nia ŝipo moviĝis al la haveno Gibara, kie komenciĝis la laboro. Tre ofte mi admiris la belegan vidindaĵon de la marbordo, la sama, kiu kaŭzis la admiron de Kristoforo Kolumbo antaŭ 500 jaroj. La haveno de Gibara ne havas kajon, la ŝipo situis meze de la golfo, kaj pro tio mi ne havis eblon ofte veni en la teron. Tamen mi profitis la unuan ŝancon por serĉi samideanojn en la urbeto. Finfine mi renkontiĝis kun la ununura esperantistino de Gibara, kiu estis bona, bela virino, tamen ŝi konis nur kelkajn esperantajn vortojn.

Post labortempo en la maro aperis la bezono labori surtere. Komenciĝis eble la plej feliĉa periodo de mia vivo. La bazo de nia ekspedicio troviĝis en la urbo Holguín. Mi veturis per aŭtomobilo tra la provincoj Holguín kaj Las Tunas, kaj mi rekontis multajn kubanojn. En Holguín mi trovis la domon de s-ino Elvira Tapia pere de Jarlibro. Ŝi konatiĝis min kun s-ino Magda Rodríguez kaj kelkaj aliaj esperantistoj. Mi havis eblecon renkontiĝi kun junaj blindaj lernantoj de s-ino Magda.

Mankas vortoj por priskribi mian ĝojon. Mi ofte vizitis la hejmon de s-ino Magda, interkonatiĝis kun ŝia edzo kaj la du ĉarmaj filinoj. Mi neniam forgesos tiun tempon.

De tempo al tempo nia ŝipo moviĝis al Havano pro laboro, kaj tiam mi ĉiam kontaktis ĉefurbajn samideanojn, miajn novajn geamikojn. Kaj mi ricevis la afablan inviton partopreni la novjaran feston de esperantistoj en la Domo de Popolkanto de Centra Havano. Tio okazis la 30-an de decembro 1990. Agra-

bla, bona vespero, amika etoso. La sekvontan tagon mi revenis Moskvon per aviadilo.

Mia lasta renkontiĝo kun Kubo okazis en majo 1991. Mi alvenis al Havano per aviadilo, okupis la lokon en nia ŝipo kaj mi sukcesis viziti nur mian karan amikinson Marcela. Tri tagojn en Kubo kaj nova vojaĝo al aliaj landoj.

Poste mi fariĝis membro de la societo "Amikoj de Kubo" en mia denaska urbo San Peterburgo. La societo bone funkcias ĝis nun, tamen tio estas temo de alia rakonto.

KIRILL YARMARKIN, Rusio

Ĉu UK havas sencion?

Julio 1995, Tampere, Finnlando: Dum la UK mia amiko kaj iama E-instruisto s-ro Aleks Humet prezentis min al s-ro Julián Hernández Angulo kaj s-ino Maritza Gutiérrez González, la tiamaj prezidanto kaj ĝenerala sekretariino de KEA (Kuba Esperanto-Asocio). Dum la konatiĝa babilado, Julián invitis min partopreni en la 2a KEA-Kongreso, kiu estis okazonta en marto 1996 en Havano. "Eble", mi respondis sen konvinko, tamen, post nelonge kaj ĉefe pro la influo de Aleks, ŝanĝiĝis mia opinio en: "Kial ne?". Aleks, hispandevena, ne nur akompanos sed jam antaŭe vizitis Kubon. Verdire mi aliĝis al la kongreso kaj eĉ vojaĝis tien, ni diru, kun la ideo turisti. Se en tiu periodo iu estus dirinta, ke mi baldaŭ amos tiun belegan landon kaj ĝian gajaniman popolon, mi certe estus kondamninta lin kiel idioton. Tamen la idioto pravis, ĉar preskaŭ tuj post mia alveno en Havano mi sentis, ke ne estos la lasta fojo, kiam mi venis viziti la landon de la barbulo, kie mi havis la plezuron kaj la honoron ekkoni multajn gesamideanojn el la diversaj regionoj kubaj, ilian viglan kaj ĝojan karakteron kaj ĉefe senti ilian varman sinceran amikecon.

Dum la 2a KEA-Kongreso mi havis la okazon multe babili kaj diskuti, tiel baldaŭ mi eksciis ion pri la multenombraj malfacilegajoj, ne nur la ekonomiaj sed ankaŭ pri la transportaj, komunikaj, kaj – pro manko da materialo – ankaŭ instruaj problemoj. Klasika plendo ja aŭdiĝis, ke eksterlandanoj neniam vizitas la provincajn grupojn kaj ke tie ili havas tro malmulte aŭ tute ne posedas lernolibrojn, vortarojn kaj infanlibrojn. Vole-ne-vole mi pensis pri la amasoj da libroj sur la bretoj de niaj kluboj. Kial do ne reveni? Unue por kontraŭdiri la aserton, ke eksterlandanoj neniam vizitas la lokajn provincajn grupojn kaj due, post akiro de la tiel bezonata materialo, mi povus kombini la viziton por alporti iom da E-libroj.

Tio estas la komenco de mia raporto farita tuj post mia dua vizito al la lando de la barbulo en la jaro 1997. Rakonti la tutan historion maleblas, nur kelkajn faktojn mi deziras diskonigi. Dek jarojn poste kaj pli ol dudek vojaĝojn al Kubo, dum kiuj mi regule vizitis la diversajn E-grupojn, ĉie en tiu bela lando, mi iom konas kaj preskaŭ komprenas la sintenon de la kubanoj. Ĉiam mi gastis ĉe la kubaj esperantistoj, multege mi lernis, cetere mi ĉiam uzas Esperanton kun ili, ĉar mi nur balbutetas la hispanan.

Kiel eŭropano, certe dum la unuaj vizitoj, mi havis la emon kondamni multajn agojn kaj kutimojn de la kubanoj, tamen rapide konstatis, ke mi pensis tro eŭropece, ĉar la vivcirkonstancoj kaj eblecoj malkompareblas al la vivo en Europo, cetere mi ofte konstatis, ke la solvoj uzataj de la inventemaj kubanoj tute ne stultas. Ekde tiam, jam en la aviadilo flugante al miaj amikoj, mi turnis mian en-elsaltilon al "akceptu" ĉar mi ne deziris esti la stultulo. Foje, kiam mi kondamnis la nigrajn kaj fetorajn nubojn produktatajn per la aŭtobuso ĉe la finhaltejo, kuba amiko reagis kaj diris: "Eddy, tia rimarko pravas, ke vi ankoraŭ ne komprenas

Kubon, ĉar ni feliĉas kiam ni vidas kaj flaras tiun fumon, ĉar tio signifas, ke la aŭtobuso funkcias..." Tio estis grava leciono por mi. Plurajn tiajn spertojn mi povus rakonti, kaj pro tio, senĝene, mi kuraĝas diri, ke multe mi lernis en Kubo.

Maleblas diri ion pri Kubo sen menciigi Esperanton kaj diri ion pri la esperantistoj kubaj. Ekde la unua kontakto dum la 2a KEA-Kongreso en 1996, mi min tuj sentis akceptita kiel amiko kaj tio sen kaŝitaj kromintencoj, la amikoj de la unuaj horoj, baldaŭ iĝis kaj restis miaj gefratoj, maleblas menciigi tiom da nomoj, ĉar mi riskas forgesi iujn. Ĉiam kaj ĉie mi estis akceptita kaj gastigita kiel bonega malnova amiko. Ofte mi devis konfesi al miaj gastigantoj, ke mi ĵaluzis pro la granda nombro da gelernantoj. Malgraŭ manko de la plej necesa instrumaterialo kaj foje eĉ sen sperta instruisto, la lecionojn sekvis dekoj da interesitoj, nombro kiu ruĝigis min, ĉar kompare al la nombro en niaj kursoj... jes tion mi komparis. Bedaŭrinde, malgraŭ tiu granda sukceso, post la fino de la kursoj, eĉ ne restas manpleno da kursanoj kiuj iĝas aktivuloj. La kialoj estas diversaj kaj plej gravas verŝajne la manko da pratikeblecoj kaj manko de la kontaktoj kun la aliaj eks-kursanoj, cetere manko da materialo kiel libroj kaj malbone funkciantaj postservoj ankaŭ gravas. Pro tiuj lastaj kialoj mi iom fieras, ke mi sukcesis helpi, malgraŭ la foje ege malfacilaj transportproblemoj. Per la apogo de UEA kaj FEL mi povis porti kaj sendi kelkcentojn da E-libroj. Denove nun UEA donis kvanton da novaj libroj, sed la nuna transportebleco estas kvazaŭ ne ekzistanta kaj mi nun atendas pli favoran cirkonstancon por venigi tiujn librojn al KEA. Ofte kubanoj kiuj klopodis korespondi kun eksterlandanoj, malkuraĝiĝis, ĉar ili ne ricevas(is) respondon, malgraŭ tio, ke la korespondanto certe respondis. La kubanoj kiuj deziras korespondi kun eksterlandano

petu al li sendi la respondon registritan, tio estas por li iom pli kosta sed multe pli sekura sistemo.

Malgraŭ, ke miaj vizitoj al Kubo ne ĉiam estis agrablaj, mi daŭre deziras reviziti tiun belan kaj kuraĝan popolon.

Viva Kubo, viva Esperanto. Amike,

EDDY RAATS, Belgio

Kubo – la duan fojon

Mi estas 59-jara germana instruisto kaj vivas en Kolonjo. Ja jam en mia infaneco mi lernis Esperanton, sed en la Esperantomovado mi neniam tre aktivis. En mia junaĝo mi iam estis (ne altranga) funkciulo de "Germana Esperanto-Junularo" (GEJ), sed nuntempe mi tute ne plu membras en iu Esperanto-organizaĵo. Tamen, la lingvouzon mi praktikas de tempo al tempo: Okaze mi partoprenas en Esperanto-aranĝoj, kaj mi havas gekonatulajn, kun kiuj mi regule komunikas Esperantlingve.

Mia unua kontakto kun Kubo tamen tute ne rilatis al Esperanto: Antaŭ preskaŭ du jardekoj, en la jaro 1986, mi vizitis Kubon en turisma grupo kun turisma programo. Tiam mi ja havis la okazon rigardi diversajn vidindaĵojn kaj poste ĝuis feriumadon sur la marbordo ĉe Varadero, sed pri la "normala" vivo de "normalaj" kubanoj mi fakte eksciis nenion. Sed dua renkontiĝo kun Kubo okazis en 2003, interalie danke al Esperanto, kaj tio estis neforgesebla travivaĵo tute nekomparebla kun la unua impresio.

Kun Norberto, kuba esperantisto el Sancti Spiritus, mi ekkontaktis pere de komuna amikino antaŭ kvin jaroj, kaj tiu kontakto bone evoluis. Kvankam ni dum jaroj nur komunikis per retmesaĝoj, ni interŝanĝis multajn informojn, pensojn kaj poste ankaŭ fotojn, kaj tiel ekestis amikeco, malgraŭ la longa distanco inter niaj du landoj. Iam fine

de la jaro 2002 Norberto proponis al mi, ke mi venu al Kubo por viziti lin kaj konatiĝi kun aliaj kubaj geesperantistoj.

Do, en la somero de 2003 mi duan fojon vojaĝis al Kubo kaj restis dum tri semajnoj, plejparte en Sancti Spiritus, kie mi estis gasto en la afablega familio de Norberto. Mi tute ne regas la hispanan lingvon, sed kaj Yoandra, la ĉarma edzino de Norberto, kaj ankaŭ Norberto José, la filo de ambaŭ, bonege parolas la Internacian Lingvon; do en Sancti Spiritus, danke al la helpo de miaj gastigantoj, apenaŭ iu pordo estis barita. Mi konatiĝis kun du aliaj Esperantistoj el la urbo, kaj ni ne nur diskutadis pri ĝeneralaj lingvaj problemoj, sed mi estis ankaŭ informita pri la agadeblecoj de la Esperantomovado en la lando kaj en la regiono. Kaj mi do multon spertis pri la ĉiutaga vivo en Kubo, kion mi kiel "normala" turisto neniam estus spertinta.

Utilaj al mi estis la interprovinciaj kontaktoj de Esperantistoj: Laŭ instiga konsilo de Norberto mi vojaĝis dum unu semajnfino al Guantánamo, kie ĝuste tiam estis karnavalo. Kiam mi alvenis tie, min jam atendis Roberto, Guantanamo Esperantisto, kiu unue gvidis min laŭ la standoj kaj butiketoj, kiuj estis ĉie videblaj surstrate, zorgis pri pensiono kaj konatigis min kun aliaj geesperantistoj. Mi lernis interalie multon pri la aktivecoj de la loka Esperanto-grupo kaj pri ĝia kunlaborado kun gesamideanoj el Belgio – oni ankaŭ montris al mi la Kulturdomon, kie okazas la regulaj renkontiĝoj kaj la lingvokursoj de la grupo. Sed tri travivaĵoj peritaj de Guantanamaj geesperantistoj restas speciale impresaj. Unue: mi povis partopreni en la distra jarkunveno de la loka sekcio de la fakorganizo de inĝenieroj kaj arkitektoj. Tie mi trinkis, manĝis kaj dancis kune kun gajaj geguantanamanoj: la etoso estis bonega, kaj mi eĉ renkontis inĝenieron, kiu dum kelkaj jaroj estis laborinta en

Germanio (jama GDR) kaj ekmemoris pri diversaj germanaj esprimoj. Due: mi estis invitita al la 15a datrevena festo de kuba junulino, kaj tiu festo estis vere impresplena – en mia hejmlando komparebla kutimo ne ekzistas. Kaj trie: Roberto ebligis al mi viziti la sanktejon de la kuba sinkretisma kulto, kiu nomiĝas "santería" – pri tio mi antaŭe tute nenion estis aŭdinta, sed nun mi povis rigardi tian sanktejon kun siaj (por mi) strangaj figuroj kaj bildoj kun propraj okuloj.

Bedaŭrinde ĉi tie mi povas redoni nur kelkajn el la multnombraj kaj tre variaj impresoj, kiujn mi havis dum mia trisemajna restado en Kubo. Kompleta raporto ege transirus la kadron ĉi tie disponeblan. Sed mi intense konscias-pri tio, ke tiom da impresoj, travivaĵoj kaj kontaktoj kun ĉarmaj kaj afablegaj gesamideanoj neniel estintus eblaj sen la Internacia Lingvo. Elkoran dankon al ĉiuj geamikoj, speciale al Norberto kaj liaj familianoj!

WINFRIED SCHUMACHER,
Kolonjo (Germanio),

Trans Atlantikon

La mondo neniam estis sufiĉe granda por malmobilizi esperantistojn. Kiam, eŭropano, mi unuan fojon transiris Atlantikon, tio aspektis al mi kiel promenado ĉar mi bonŝance naskiĝis en la 20-a jarcento. Sed mi pensis tiam al mia patro kiu ĉirkaŭ la jaroj 1900 kolektadis poŝtmarkojn (jam sufiĉe multajn por tapeti la kvar murojn de la dormoĉambro), kaj kutimis alparoli min pri la etaj ŝtatoj de la mondo kies poŝtaj figuroj turnis rigardojn al foraj horizontoj. Por mi Kubo, kiel Antiloj, estis kiel Andoro aŭ Monako... surglobaj punktoj, vivlokoj de homaj gefratoj kiujn mi havos nenian okazon renkonti. Kaj venis esperanto en mian vivon kiam 13-jara... kaj venis la eblecoj post evoluo de mia pro-

fesia vivo... dediĉi pli ofte salajrajn plusojn prefere al monda malkovro ol al superfluaĵoj havaĵoj, kaj mi decidis viziti Kubon kiam UEA planis kongresi tie antaŭ 15 jaroj.

La unuan tagon de mia vizito en la kongresejon, mi admiris la organizon de la loka komitato, kaj tuj pensis pri malkovro de geamikoj. Mi iris al kuba deĵoranto... kaj mi petis lin senŝerce kaj abrupte: "Mi emus pasiĝi grandparton de tiu tago kun kubano preta akompani min, mi volas plene ĝui la avantaĝon de esperanto, ne plu vortumi aĉajn anglajn vortojn kiujn mi neniel perfektas, mi sentos min vera esperantisto en tiu mondregiono nur se mi promenos kun frato aŭ fratino..." kaj mi ade dankas ke oni turnis min al Norberto. Mi konfesas ke mi fariĝis subite alia; kun Norberto mi iris eksteren en la kuban ĉefurbon. Pro la horo, mi diris "elektu por ni memorindan manĝlokon..." ni iris al "Bodeguita del Medio" kie ni manĝis laŭ la loka modo, sed sub la memoro de la fama verkisto Ernest Hemingway. Poste ni uzis niajn piedojn kaj lokajn busojn por iri en la ĉirkaŭurbo kaj viziti muzeon. Ni vidis belajn avenuojn kaj ordinarajn domojn. Ni ĝuis glaciaĵojn kaj trinkis sukron. Ni parolis nek france, nek hispane. Ni esperantumis. Dek horojn antaŭe, ni sciis unu de la alia nek la nomon, nek la aspekton, kaj ne diskutis pri propraj ideoj, simple venis al ni la komunaj sentoj kiuj faris nin geamikojn.

En antaŭaj jaroj mi interesiĝis kiel estrarano de UEA al la atingoj de la landaj asocioj, cele kunordigi efikan kaj utilan respondon al komunaj bezonoj. Samtempe naci-skale, mi emis en la franca asocio helpi lokajn grupojn evolui sukcese. En kvar aŭ kvin sinsekvaj UKoj, internacia respondeculo, mi kunvenigis, kiel en UN aŭ Unesko, la respondeculojn de 40 aŭ 50 landaj asocioj kaj studis kun ili la diversajn spertojn kiuj povus helpi interŝanĝe, sed konfesindas ke tio plej ofte fiaskis. Male, en mia propra lando mi

provis telefone, letere, rete, teni vertikalajn kontaktojn kun la respondeculoj de la disaj laborgrupoj kaj ni gajnis Pokalon Fyne. Mi vidis, ke tiuj estas la vera bazo de nia ekzisto, ke kompilo de ĉies spertoj helpas la volontulojn kiaj certe estas en la Kuba movado, riski novaĵojn aŭ plibonigi eksperimentojn; mi tiel havis la konfirmon, ke pli gravas lokaj animantoj ol grandkapuloj. Pro proksimo al la informpetantoj ili donacas pli fervore kaj utile ol povas fari elektitaj homoj ĉe tro tegmenta nivelo. Evidentiĝis al mi, ke ĉesupre kaj malsupre ja paralelas ne malhaveblaj taskoj. Zamenhof povintus esti la diktatoro, la reĝisoro de la internacia lingvo. Sed li tuj transdonis ĉion al la E-popolo, kiu malgraŭ la pezo de 10 jardekoj plutenis la torĉon. La internacia asocio plu rolos kiel helpa administranto se oni direktas al ĝi larĝokulajn homojn, sed male restos surloke la ordinaraĵoj por regi informon, instruadon kaj praktikadon. Laŭaspekte izolitaj ofte, ili profitos konsilojn kaj rekomendojn de ĝustaj gazetoj kaj kuraĝaj perantoj kaj vendos al la eklerantoj la plezuron ĝui ĉiamaniere nian lingvon: staĝojn, babilrondojn, renkontojn, legadon, ludojn, distraĵojn, kulturajn eventojn,

kiajn povas produkti kaj proponi la nuna amaso da komunikiloj. Sed oni pensu, ke ligo de unuopulo kun amiko (se eble amikoj) (el la ceteraj mondpartoj) argumentos ĉiam al la koroj laŭ la ideoj de Zamenhof kiel ponto al paco. Kaj tian mesaĝon mi deziras al la kubaj geamikoj.

La gazeto *Granma* anoncis la venon de 2 400 delegitoj el 60 landoj, kaj memorigis pri la unua UK en Bulonjo-ĉe-Marzo. Ja estis fadeno inter Kubo kaj Francujo. *Granma* ankaŭ memorigis pri la naskiĝo de Esperanto en Kubo inter 1910 kaj 1923, jam citis 26 esperanto-kursojn, mi scias ke multe prosperis de tiam danke al viaj streboj, kiujn raportas la revuo *Esperanto* kaj intervenoj en la UKoj. En Francujo, nia revo pluas de jaro al jaro, ni havas ĉiujare du mil ĝis tri mil komencantojn, kaj ni instigas ĉiujn aliĝi al granda asocio kiu helpas plivalorigi Esperanton ĉe mondaj registaroj, sed ni ankaŭ insistas, ke la unuopulo meze de kamparo, de montaro aŭ funde de urbo, esploru por amikoj ie sur la globo por vivigi tiom apartan amikecon kiun mi mem sentis inter Francujo kaj Kubo, inter Norberto kaj

JEAN LOUIS-TEXIER, Francio

**Avanco estas preta aperigi viajn kontribuojn,
kun temoj pri la enlanda movado
kaj ĝia konekto kun la ekstera mondo.
Elmontru la funkciadon de la movado.
Sendu ĉion al la redaktoro ĉe la adresoj:**

**Poŝtkesto 77, 60200 Sancti-Spiritus
norberto@ssp.desoft.cu**



... la nacia informagentejo AIN utiligas Esperanton en la novaj servo, kiu atingas ne nur kubanojn, sed ankaŭ eksterlandanojn. La ftt-ejo www.ain.cu legeblas en pluraj lingvoj, inter kiuj Esperanto troviĝas ekde la 17a de marto 2005. Rekta aliro al la esperanta versio eblas per: www.cubanoticoj.ain.cu/

... Radio Sancti Spiritus plu subtenas Esperantan version de sia retpaĝo, kiu legeblas ĉe: www.radiosantispiritus.co.cu/Version%20Esperanto/EsperantoHome.htm

... la retejo de la provinca ĵurnalo *Ahora* (Nun), en la orienta provinco Holguín, utiligas Esperanton. Aktualaj novaĵoj legeblas ĉe: www.ahora.cu/SECCIONES/Esperanto.htm

... La refortigo de UEA atingis gravan mejlostonon en

septembro, kiam la Asocio denove nombris pli ol 6 000 individuajn membrojn, unuafoje post la jaro 2001. La 30an de septembro la membronombro estis 6 014, kio superas per 158 la definitivan nombron de la pasinta jaro. Kompare kun septembro 2004 la kresko estas 399. [Gazetaraj komunikoj de UEA].

... laŭ diro de fakuloj, la estonteco de eŭropaj lingvoj estas minacata. La 25-nacia Eŭropa Unio devas agi decide, se ĝi deziras garantii la estontan vivipovon de siaj 21 oficialaj lingvoj, laŭ internacia renkontigo de ekspertoj en Vilno, Litovio. La averton oni publikigis la 22-an de aŭgusto 2005 nome de la pli ol sepdek partoprenintoj en la Kvara Nitobe-Simpozio (30a julio – 1a aŭgusto), in-

ter ili universitatoj, politikistoj, registaraj funkciuloj, kaj lingvaj aktivuloj. "Oni multe maltrankviliĝas pri la estonteco de la pli malgrandaj naciaj lingvoj, inkluzive la plimulton de la lingvoj de la novaj ŝtatoj-membroj de EU", diris d-ro Humphrey Tonkin, profesoro pri humanecaj studoj en la Universitato de Hartford, Usono, kaj unu el la kunvokintoj de la simpozio. "Multaj decidoj estas nun farataj cele al fortigo de eŭropa unueco, sed sen konsidero de iliaj lingvaj implicoj", aldonis d-ro Tonkin. "Estis pli ol 500 eraroj en la latva traduko de la Konstitucia Traktato", notis la latva ministro pri edukado kaj kulturo, d-rino Ina Druviete. "Kiel entute havi sencoplenan politikan debaton en tiaj kondiĉoj?". D-ro François Grin, profesoro pri ekonomiko en la Universitato de



Genevo, liveris pritakson de la ekonomiaj avantaĝoj al Britio de la vasta uzo de la angla kontraste al pli larĝa lingvomikso en Eŭropa Unio. La Simpozio aŭdis ankaŭ pledantojn por pli granda rolo por la internacia planlingvo Esperanto ene de EU. "Ĝi estas la sola solvo samtempe justa kaj efika", pretendis d-ro Sean O'Riain, irlanda diplomato, kiu aktuale prezidas Eŭropan Esperanto-Union. La konkluda dokumento de la Simpozio, redaktita de unu el la organizantoj de la Simpozio, d-ro Mark Fettes, profesoro pri edukado en Universitato Simon Fraser, Kanado, alvokas la ŝtatojn-membrojn de EU al kunlaboro pri evoluigo de komuna lingva kadro, kiu ekvilibrigu, unuflanke, protekton kaj pozitivan agnoskon de lingva diverseco, kaj, aliflanke, la bezonon de efika, altkvalita komunikado inter ĉiuj civitanoj de EU. La Simpozion organizis Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvo-Problemoj, en kunlaboro kun la Universitato de Vilno kaj la Litova Akademio de Sciencoj, kun subteno de Esperantic Studies Foundation. [Gazetaraj komunikoj de UEA].



... la akcepto de tri gravaj dokumentoj kaj la reelektado de Koĉiro Matsuura kiel ĝenerala direktoro markis la 33an Ĝeneralan Konferencon de Unesko, kiu kunvenis en Parizo de la 3a ĝis la 21a de oktobro. Por la E-movado la plej interesa el la akceptitaj dokumentoj estas la Konvencio pri la Protekto kaj Antaŭenigo de la Diverseco de Kulturaj Esprimoj, en kiu Unesko denove rememorigas pri la lingva diverseco kiel fundamenta elemento de kultura diverseco. La du aliaj novaj dokumentoj estas la Internacia Konvencio kontraŭ Drogoj en Sporto, kaj la Universala Deklaro pri Bioetiko kaj Homaj Rajtoj. En la programo de la Konferenco estis ankaŭ festo por omaĝi la 60-jariĝon de Unesko. UEA kaj ILEI, kiuj estas en operaciaj rilatoj kun Unesko, estis invititaj al la Konferenco kiel observantoj. Kiel delegitoj de UEA ĉeestis Renee Triolle kaj Barba-

ra Despiney, dum Jean-Pierre Boulet, Monique Arnaud kaj Francois Lo Jacomo reprezentis ILEI. Krom partopreni en pluraj kunsidoj de la Konferenco, ili havis kontaktojn kun aliaj delegitoj. Ili partoprenis ankaŭ en la ekspozicio pri la Unesko-programo "Edukado por ĉiuj", kaj krome ili prezentis en du-minutaj filmetoj, kiel la du E-organizantoj kontribuas al tiu ĉefa programo de Unesko. La filmoj estis senĉese montrataj en la halo de la Unesko-domo, kie okazis la ekspozicio. [Gazetaraj komunikoj de UEA].



... Radio Havano-Kubo daŭre elsendas dimanĉe programaron en Esperanto. Krome, ĝia retejo havas sekcion en Esperanto pri la kvin kubaj herooj enkarcerigitaj en Usono. La retadreso estas: www.radiohc.cu/heroes/heroesesperanto.htm.

5 Herooj Enkarcerigitaj de l'Imperio



Daŭre entreprenenda tasko por la kuba movado

JULIÁN HERNÁNDEZ ANGULO

La utiligo de Esperanto estas grava, kolektiva kaj unuopa faktoro por la evoluo de la internacia esperantista movado. Ĝuste pro tio nuntempe ĝi estas unu el la tri agadkampoj en la strategio de UEA, kiu laŭ mia vidpunkto ĉefe alcelas la agaddirekton profesiiĝon.

Engaĝitaj en la regula aŭ ĉiutaga esperantista agado, la gvidantoj de nia movado kaj la plurjaraj asocioj ne rimarkas kiom grava estas por la nuntempa kaj estonta vivo de Esperanto konsciigi la membraron pri ties praktikaj celoj.

La utiligo de la internacia lingvo donas plian signifon kaj motivon al ĉies esperantisteco, ĉar ĝi estas vojo pere de kiu, post la baza lernado oni daŭre povas alproksimiĝi kaj rilatiĝi kun Esperanto kaj ties komunumo.

Landaj asocioj konsciigu sian anaron, ĉefe sian instruanton kaj estraranojn pri tio, tiel ke ili ofte informu al novbakitaj esperantistoj kiel ili povas utiligi la lingvon, kion ili povas fari pere de la lingvo. Oni profitu renkontiĝojn, kunsidojn, aranĝojn, ktp. por diskonigi gamojn da fareblaj kaj farendaj aferoj. La



Dum la 5a Kongreso de KEA laborkomisiono aparte priirektis la fakajn agadon en la asocio. Ili redaktis rekomendojn kiuj validas por la ĉiutaga laboro en tiu agadsfero. Foto: Calienes.

esperantistoj konsciuj, ke Esperanto estas utila ĉar pere de ĝi, ili povas rilatiĝi kaj amikiĝi kun aliaj homoj, plialtigi sian lingvan kaj kulturalan nivelon, korespondadi kun landaj kaj alilandaj esperantistoj, interŝanĝadi spertojn kun samfakuloj tra la mondo, konatiĝi kun la kulturo de aliaj popoloj, montri siajn personajn talentojn, ampleksigi sian socian kaj kulturalan horizonton, fariĝi pli bonaj kaj noblaj homoj.

El tiuj utiloj, mi konsideras unu el la plej gravaj la fakan aplikon de la internacia lingvo al ĉiuj sferoj de la homa vivo. Por atingi pli altan ŝtupon tiucele, Kuba Esperanto-Asocio devos informadi al la esperantistaro pri la faka agado ene de la internacia Ekomunumo, kiom da fakaj organizaĵoj ekzistas, kion ili celas kaj faras, kiel oni povas aniĝi; oni devas diskonigi fakajn artikolojn, kio sendube stimulos fakulojn kunlabori kaj ekagii tiucele. Internacia Ligo de Esperantistaj-Instruistoj (ILEI), Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE), Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj (IADEM), Muzika Esperanto-Ligo (MEL), Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE), Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), estu familiaj organizaĵoj por la Esperantistaro, ĉar ili aŭdas pri ili en aranĝoj, foliumas ties revuojn kaj prikomentas ties novaĵojn. En la revuoj *Esperanto*, *Monato*, *El Popola Ĉinio*, kaj alispecaj bultenoj kaj magazinoj estas rubrikaj kie aperas popularsciencaj artikoloj kaj skribaĵoj. Ili respegulas la fakan agadon ene de la komunumo.

Laŭ mia persona sperto mi povas diri, ke danke al Esperanto mi havis la ŝancon legi artikolojn kaj verkojn de elstaraj Esperanto-instruistoj, partopreni ILEI-Konferencojn kaj konatiĝi kun nuntempaj unuaklasaj Esperanto-pedagogoj kiuj solidigis mian pedagogian kulturon kaj pliriĉigis min kiel profesiulon.

Niaj rilatoj kun eksterasociaj sciencaj institucioj devos esti daŭraj kaj viglaj. Esperantistaj fakuloj trovu manierojn kaj rimedojn prezenti Esperanton en fakaj kongresoj, konferencoj, renkontiĝoj, seminarioj, ktp. kiuj okazas diversloke kaj diverstempe en la mondo. Deca, profesia kaj digna stilo starigi rilatojn kun sciencistoj.

Praktike ili konstato, ke Esperanto estas nek nulajo nek mortintaĵo. Oni traduku plej gravajn artikolojn de Esperantistaj fakuloj kaj sendu ilin al tiuj institucioj. Malnovaj kubaj Esperantistoj memoru nian partoprenon en la renkontiĝoj de lingvoj kaj kulturoj Expolingua okazintaj en Havano dum la 90aj jaroj, kie ni prelegis pri la Internacia Lingvo, ekspoziciis kaj renkontiĝis kun unuaklasaj lingvistoj kiel d-rino Rosa Antich, d-ro Max Figueroa, d-ino Sonia Bravo kaj aliaj. Kiel rezulto de tiuj sciencaj renkontiĝoj ili vidis Esperanton alimaniere; d-ro Max Figueroa eĉ lernis Esperanton.

Dum sia 26jara ekzisto, KEA ne preteratentis tiun laborsferon, ĉar ekde ĝia oficiala fondiĝo ĝi kreis la scienc-teknikan sekcion kiu arigis fakulojn kaj organizis plurajn seminariojn pri la apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko. Tamen la nuntempo postulas, ke ni pli kaj pli prioritatu kaj flegu ĝin. Venontmaje ni okazigos plian seminarion pri apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko kaj ni esperas ke ĝi estu tribuno, por ke la Esperantistaj fakuloj prezentu prelegojn, dividu kaj interŝanĝu spertojn pri diversaj fakoj, kaj ke ĝi stimulu kaj spronu la kreadon de fakaj grupoj, kiuj multe povos helpi unuopajn fakulojn altigi sian sciencajn kaj profesionajn nivelojn.

SAEST'2006 estu ligo inter la pasinta kaj la estonta faka agado kaj ĝi igu niajn fakulojn pli kaj plu labori celante ties perfektigon. Tiel nia movado plenumos unu el la ĉefaj prioritatoj de UEA por tiu ĉi periodo: Utiligo.

